

n-ro 54

oktobro 1996

Monato-serio pri Orienta Eŭropo

Dum la Universala Kongreso en Prago mi diversloke lanĉis la ideon ke la revuo Monato aperigu serion da artikoloj pri la ekonomia kaj politika evoluo de la eks-komunismaj landoj dum la pasintaj jaroj. Ĝis nun ne venis reago al miaj dumkongresaj proponoj.

Mi certas ke multloke en la mondo oni scivolemas kiel landoj adaptis sin al subitaj ŝanĝoj, kiuj estas la eraroj kaj sukcesoj, kia estas la etoso ĉe la popolo, ktp. Monato estas bonega kanalo por diskonigi tiujn spertojn.

Komforme al la principoj de Monato, la artikolojn verku loĝantoj de la koncernataj landoj. Prefere estu iu skipo en la regiono kiu povas prezenti preskaŭ pretan serion al la redakcio. Ne sufiĉas artikoloj pri du aŭ tri landoj. Antaŭ ol povi komenci aperigon de serio necesas esti certa pri kontribuoj el la tuta regiono.

Roland ROTSAERT, redaktoro pri ekonomio de Monato

Enhavo

Anoncitaj aranĝoj	3
Raportoj de IKEF-kunvenoj	4-10
Sindikata Terminaro - Stipendio Ivo Lapenna - Esperanta CD-ROMo	11
Informilo por Interlingvistoj	12
AIS-konferencoj	14
Komercaj petoj kaj proponoj - Identecŝildoj	15-16

La Merkato (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** estas dujara eldono por la membroj de IKEF. Ĝi ne estas aparte vendata.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikō Yamasaki; S-ro Daniel König.

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo:

Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)knooppunt.be.

Atentu !

Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondajtoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

La jara membreca kotizo estas 600 belgaj frankoj (BEF) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") (aŭ egalvaloro: 30 NLG, 30 DEM, 20 USD) kaj 400 BEF por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj") (20 NLG, 20 DEM aŭ 14 USD).

Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

Kontoj: - Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per **eŭroĉeko** (en belgaj frankoj, kun kartonnumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT, kaj per internaciaj respondkuponoj (1 IRK = 34 belgaj frankoj).

Perantoj:

Ĉinio: S-ro **WANG Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an

Francio: S-ro François-Xavier **GILBERT**, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy)

Germanio: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank

Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hungario: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

Italio: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Japanio: S-ro **YAMASAKI** Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12; retpoŝto study069(a)jpdokyo.dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

Anoncitaj aranĝoj

Lublin - Polio, 26 oktobro ĝis 2 novembro 1996: Internacia Seminario "Junularo sen limoj - Agado por internacia interkompreniĝo". Organizas: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj Skolta Esperanto Ligo. Informoj: Saskia Idzerda, Androsdreef 86, NL-3562 XC Utrecht, tel: ++31 30 2621615, fakso: post telefona interkonsento, rete: SJAIdzerda(a)capvolmac.nl.

Moskvo, 31 januaro - 2 februaro 1997: Rusia Esperantista Kongreso "REK'97". Kongresa temo: Patroj kaj filoj en nuna Esperantujo. Ankaŭ kongreseroj rilate al 850-jariĝo de Moskvo. Antaŭkongreso 29-30 januaro: Pedagogia Seminario. Postkongreso 3-5 februaro: Lingvo-etnaj problemoj sur la postsovetia spaco. Informoj: Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RU-143000 MOSKVA ODINCOVO 6; telefono/fakso (095) 2437456; rete era(a)las.apc.org.

Aalen kaj Stuttgart, Germanio, 10-19 majo 1997: Eŭropa Kultura Festivalo, Eŭropa Junulara Parlamento, Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso. Informilo havebla ĉe LKK: Esperanto-Stuttgart, Dachtlerstr. 21, D-70499 STUTTGART. (Dum la aranĝoj ankaŭ estas planata IKEF-kunveno.)

Antwerpen, Belgio, 30 majo - 1 junio 1997: Antwerpen '97. Temo: Komunikado. Informoj: Flandra E-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 ANTWERPEN, rete fel(a)knooppunt.be.

Jekaterinburg, Ruslando, 9-17 aŭgusto 1997: Eŭropo-Azio '97. Informilo havebla ĉe LKK: Urala Esperantista Asocio, p.k. 67, RU-620077 JEKATERINBURG; rete: hrgo(a)sbank.e-burg.su.

Interreto (TTT/WWW)

Informoj pri Internacia Tradukreto (ITRE) nun ankaŭ haveblas tra Interreto:

<http://www2.dk-online.dk/users/TeamHolm/itre.htm>

La Komerca Ĉambro de Colmar (Francio) tra Interreto diskonigas la liston de neokupitaj profesiaj ejoj en lingvoj franca, germana, angla kaj Esperanto:

<http://www.rmcnet.fr/cci>

Pri IKEF-ĉeesto en TTT mi esperas informi vin en la venonta La

Merkato.

RR

Radio Havano Kubo

Frekvencaro al Eŭropo estas 9550 khz - 31 m (19.30 kaj 22.00 UTC). Ofte Radio Havano disaŭdigas programeron pri la ekonomia situacio de la lando.

Adreso: Radio Havano, Esperanto-Redakcio, pf. 6240, Havano, Kubo.

IKEF-kontaktkunveno kun Komerca Ĉambro de Ĉeĥa Respubliko

Je vendredo matene 25 membroj de IKEF aŭskultis, en salono disponigita de la ĉeĥa filio de firmao Bosch, klarigon pri la evoluo de la ĉeĥa ekonomio de reprezentanto de komerca ĉambro. S-ro Franz Braun rapide prezentis IKEF kaj donis superrigardon de la diversaj produktaĵoj de la firmao Bosch. Dipl.Inĝ. Eugen Lasczó, estro pri internaciaj rilatoj de la komerca ĉambro prezentis la ĉeĥan ekonomion kaj la agadojn de sia organizo.

Ekonomia politiko

Post 40 jaroj de plansistemo, kiu neglektis la dezirojn de la homoj, necesis transformiĝo de la leĝoj sed ankaŭ de la pensmaniero. Hodiaŭ, la homoj devas esti 'respondecaj'. Por tio necesos longa tempo, eble unu generacio. Tamen, oni povas konstati ke, post 7 jaroj, plejparto de la civitanoj facile adaptiĝis. Ĉefe la maljunuloj suferas, ĉar ili ne komprenas ke ĉiu ricevu laŭ sia strebado.

La privata sektoro stabiliĝas. Komence estis grandega emo por entrepreni. Oni donis 1,5 milionojn da licencoj, sed plej granda parto de la licenculoj bankrotis rapide. Multaj ne konis la metodon por administri firmaon kaj mankis iu organizo por instrui ilin. Tio iĝis la ĉefa celo de la komerca ĉambro. La ciferoj montras duobliĝon de la ekonomia produkto dum la pasintaj kvin jaroj. La ŝtata buĝeto estas en ekvilibro; estas rezulto de racia kaj streĉa politiko.

Sociala politiko

Ĉeĥio havas 10 milionojn da enloĝantoj. La ĉeĥa monunuo, la krono, estas konvertebla. Ĉar ekde la komenco ĉiuj subvencioj estis forigitaj, la civitanoj suferas: la prezoj estas okcident-eŭropaj, sed la salajroj restas ĉeĥaj. La turisma industrio bonfartas, sed estas deficito en la internacia interŝanĝo de varoj. Por povi eniri la Eŭropan Union kaj por kuraĝigi eksterlandajn investantojn, ne estu inflacio; oni trovu ekvilibron inter evoluo de la prezoj kaj de la salajroj. Fremdlandaj investantoj povas havi 100% de la kapitalo de firmao.

La Komerca Ĉambro

Ĝi estas la plej grava organizo por helpi al la realigo de la ŝtata

politiko sur la kampo de ekonomio. En Prago estas la ĉefsidejo; krome estas 88 regionaj ĉambroj.

KĈ estas sendependa institucio. La membreco ne estas deviga kaj la kotizo estas simbola: 2500 kronoj por firmao kaj 50 kronoj por individuo. Ĝi nur kovras 2% de la elspezoj. La ceteraj monrimedoj troviĝas en la vendado de servoj. KĈ organizas interŝanĝojn kun eksterlando (seminariojn, foirojn, konferencojn), partoprenas en eŭropaj programoj (ekz. PHARE), donas informojn dank'al tutmondaj datumbazoj, prizorgas doganajn kaj jurajn problemojn, funkcias kiel komerca tribunalo, ktp.

Kelkaj statistikoj

MEP (malneta enlanda produkto): + 5,2%
industria produkto: + 9,5%
personaj elspezoj: + 6%
nivelo de senlaboreco: 2,9% meze, 1% en Prago
(laboreco artefarita de la ŝtato: 5,1%)
eksporto: 450 miliardoj da kronoj
importo: 540 miliardoj da kronoj (i.a. novaj teknologioj)
ŝuldoj de la ŝtato: 16,3 miliardoj da usonaj dolaroj
(relative malmulte)

François Xavier GILBERT

Ĝenerala kunveno de IKEF dum la UK en Prago

Je vendredo posttagmeze okazis la jara ĝenerala membrokunveno. Prezidanto Franz Josef Braun malfermis la kunsidon kaj salutis 55 ĉeestantojn, inter ili 23 membrojn. Apartan saluton ricevis d-ro Werner Bormann, prezidanto de la Akademio de Esperanto kaj membro de IKEF. Li atentigis pri tio, ke ankaŭ la prezidanto de UEA, d-ro Lee Chong, estas membro de IKEF. Jen la tagordo:

1. Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1995
2. Financa raporto por la jaro 1995
3. Decido pri la financa deficitado de 14.005 BEF
4. Malŝarĝigo de la estraro
5. Elektoj al la estraro
6. Diskutado

En sia raporto la prezidanto menciis, ke la agado dum la jaro 1995 okazis sub la rigardo al la 10jara ekzistad-jubileeto de IKEF. Dum la UK en Tampere la fakgrupo sukcese agadis. Krom la viziton al la Komerca Ĉambro de Tampere oni aranĝis kune kun la Esperanto Centro Paderborn, Germanio, kvartagan seminarion pri optimumaj strategioj. Fine de 1995 aperis en la UEA-revuo "esperanto" tutpaĝa artikolo "Kiu plej praktike uzas Esperanton" pri IKEF. Oni prave povas diri, ke IKEF estas pli ofte menciata en la Esperantista mondo kaj ke per tio la renomo de la fakgrupo pli kaj pli kreskas. Braun raportis, ke la oficon de kunordiganto de la Terminara Sekcio transprenis s-ro Yamasaki Seikō. Unua frukto estas la "Sindikata Terminaro" - esperantigo de la EU-terminaro "Glossaire du monde de travail et des mouvements syndicaux", ĵus prezentita dum la ĉi-jara kongreso. Ĝi aperis en la nova domstilo de IKEF.

La kasisto, Roland Rotsaert, klarigis la kialojn de la pasintjara financa deficitito. Dum dek jaroj la kotizoj restis senŝanĝaj. Je elspeza flanko estis en 1995 la investoj en nova domstilo kaj la kunaranĝo de la seminario en Tampere. La deficitito estis antaŭvidita kaj jam pasintjare la kotizsistemo estis adaptita. Tio tamen nur ekde 1996-1997 havos plenan efikon.

Agadraporto kaj financa raporto pri 1995 estis aprobitaj. Reelektiĝis estraranoj Braun kaj Picasso.

La IKEF-identecŝildaro, kiu laŭplane dum 1996 estu reeldonata, ne plu aperos en sia nuna formo, ĉar apenaŭ venis respondoj al al formularo kiu aperis en LM53. Anstataŭ ĝi, unu fojon en la jaro aperos kompleta membrolisto en la revuo La Merkato; en ĉiu numero de La Merkato aperos la identecŝildoj ricevitaj dum la pasintaj monatoj.

Reage al alvoko al persono kiu pretas prizorgi Interreto-paĝojn por IKEF anoncis sin jugoslava studento. Dum la venontaj monatoj li ekfaros la bazan strukturon; celo estas ankaŭ tra ĝi diskonigi kompletan, daŭre ĝisdatigitan identecŝildaron. La membroj jam nun bonvolu traduki la tekston de la nova IKEF-informilo al sia propra lingvo, por aperigo en Interreto.

André Ruysschaert (Luksemburgo) serĉas komercistojn/ekonomikistojn kiuj pretas tralegi la ĵus finitan E-tradukon de la traktato pri la Eŭropa Unio kaj doni siajn komentojn. Teksto havebla sur papero aŭ sur disketo. (Vidu jarlibron por la adreso.)

Roland Rotsaert prezentis ideon jam preparolitan kun kelkaj TEĴA-membroj. Jam pasis 7 jaroj post la disfalo de la politikaj strukturoj en orienta Eŭropo. Necesas ke Monato iom strukturigite raportu pri tio; ekz. Ĉiumonate aperu detala artikolo pri unu eks-komunisma lando, el vidpunkto de ekonomio, politiko, kulturo... IKEF-anoj (kaj aliaj) el la koncernataj landoj jam komencu la verkadon. Serio komenciĝu fine de 96 (oktobro-novembro).

Estrarano Istvan Gether (H) lanĉis ideon pri studo de enkondukebleco de Esperanto en internaciaj firmaoj. Tia studo estus farata de sendependa konsulta kompanio. La estraro dum la venontaj semajnoj pridiskutos la ideon kaj eventuale faros proponon al UEA.

FJB/RR

65a Itala Kongreso de Esperanto (Ferrara, 24-30 aŭg. 1996)

La ĉi-jara itala kongreso havis kiel ĉefan temon "La internacia komunikado en la malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj". La temo estis pritraktata en la konferenca salono de la Komerca Ĉambro de Ferrara en du sesioj je lundo 26 kaj mardo 27 aŭgusto. La aranĝo celis ankaŭ ne-Esperantistojn. Tial ĝi okazis per simultana interpretado en la itala kaj Esperanto. Sur la programo troviĝis 12 prelegantoj.

Ĉar la ĉefa temo vere rilatis al la celoj de IKEF, la organizantoj jam frue invitis IKEF al partopreno. Fine IKEF estis reprezentata per tri estraranoj kiuj prelegis - s-roj Franz Josef BRAUN, prezidanto, François-Xavier GILBERT, Daniel KÖNIG - kaj per la revizoro, d-ro Gianfranco POLERANI. Aldoniĝis s-ro Josep FRANQUESA SOLE el Hispanio per sia prelego "Esperanto: utila lingvo por komercaj aferoj"; li dum la kongreso aliĝis al IKEF. Kiel kunordigantoj de la sesioj funkciis d-ro Umberto BROCATELLI (lunde) kaj s-ino Michela LIPARI (marde).

En sia unua prelego s-ro BRAUN parolis pri la duparta temo "Esperanto - bona rimedo por komunikado en internacia komerco" kaj "Ni serĉas liverantojn en Italio por nia produktado". En la unua parto li raportis pri tio, kion IKEF faras sur la tereno de internacia komunikado, ekzemple kreado de terminaroj, eldono de bultenoj kaj verkado de fakaj artikoloj, subteno de komercado inter Esperanto-parolantaj komercistoj, reklamanoncoj de entreprenoj en Esperanto-gazetoj. En la dua parto li prezentis la germanan firmaon BOSCH, en kiu li laboras kiel aĉetsekciestro. Ĝi daŭre serĉas novajn liverantojn de ĉiuspecaj materialoj kaj ĉe tio ankaŭ uzas la internacian lingvon. La espero, ke inter la ĉeestantoj troviĝus potenciala nova liveranto ne plenumiĝis.

S-ro GILBERT prelegis pri "La agado de Komercaj Ĉambroj". Kiel emerita direktoro de komerca Ĉambro en Francio, li bone kapablis skizi la historion de la Ĉambroj, komencinte en la jaro 1600 per reĝa letero de Henriko la 4a al la komercistoj en Marseille kiel instigo al reciproka helpo. La celo de la nuna agado estas servo al la entreprenoj, ekzemple informoj pri merkatoj, klerigo kaj instruo de dungitoj, specialaj laŭbranĉaj konsiloj, helpo ĉe importado-eksportado kaj esploradoj. La multaj komercaj Ĉambroj en la mondo - sole en Eŭropa Unio estas 750 - formas internacian reton. Kiel 'tegmenta' organizaĵo troviĝas en Parizo la "Internacia Komerca Ĉambro", kiu zorgas pri terminaroj, ĝeneralaj kontaktoj, arbitraciaj kortumoj, k.s.

S-ro KÖNIG prezentis la "Internacian Tradukreton pere de Esperanto"

(ITRE). Ĝi estas fondita kaj kunordigata de s-ro Daniel DURAND, Francio, membro de IKEF. Aro da Esperantistoj-tradukistoj (nun 53 por 25 lingvoj) pretas traduki kiun ajn tekston el iu nacia lingvo en Esperanton kaj en aliajn lingvojn. Por la traduklaboroj oni fakturas prezon laŭ modera tarifo.

En sia dua prelego s-ro BRAUN raportis pri la projekto "Tweeluik" (panel-paro). Estas studaĵo farita de la Centra Gelderlanda Komerca Ĉambro en Nijmegen, Nederlando, pri la taŭgeco de novaj merkatoj ekster Okcidenta Eŭropo por etaj kaj mezgrandaj entreprenoj (EME). Surpriza rezulto de la studaĵo estas ke i.a. Novzelando, Ĉilio, Argentino, Ĉeĥio kaj Israelo estas ŝtatoj, al kiuj valorus por EME klopodo pri eksportado. S-ro Kees RUIG, konsilanto ĉe tiu komerca ĉambro kaj IKEF-membro, tradukis la resumon ankaŭ al Esperanto. En venonta La Merkato aperos detala recenzo.

Krom la IKEF-anoj prelegis aliaj personoj pri diversaj aferoj rilate al la ĉefa temo. La aranĝo estis bona kaj valora. Partoprenis je lundo ĉ. 50, je mardo ĉ. 30 personoj. La konferenca salono kun simultana interpretado permesis profesiecan nivelon. Negativaĵo estis la malgranda nombro de ĉeestantaj ne-Esperantistoj. Ankaŭ la kongreso mem, kun preskaŭ 200 partoprenantoj, sub agema reĝisorado de s-ino Edvige Tantin ACKERMANN, ofertis ampleksan kaj plaĉan programon.

F.J. BRAUN

IKEF-kunveno okaze de la la Azia Kongreso en Ŝanhajo

La kunveno okazis je sabato, 24 aŭgusto 1996, 14h00 - 15h30, en la salono Lusin 1. Gesamideanoj sidis ĉe kelkaj rondaj tabloj. Ĉiuj seĝoj estis okupitaj, do la malfruiĝintoj devis stari. Kunprezidis YAMASAKI Seikō kaj WANG Tianyi; ĉeestis 26 personoj.

YS klarigis ke unu el la plej gravaj taskoj de IKEF estas terminologio: kiel la plej novan atingon, li prezentis "Sindikatan Terminaron". Li atentigis pri la fakto ke IKEF ne faras negocon mem, sed peras kaj informas pri tio. S-ro Wang laŭtlegis salutleteron de la prezidanto. Poste li faris du konkretajn proponojn:

a. Ĉinio estas tiel granda lando ke unu peranto ne povas kovri la tutan teritorion. Li proponas ke oni nomumu plurajn delegitojn, po unu por ĉiu regiono.

b. Oni havu kunvenon kie oni povas negoci inter si, kun aliaj komercaj organizoj, kiel TAKE.

La prezidantaro petis individuajn konatojn esprimi sian opinion. Kiel unua parolis s-ro Miyoshi, japana industriisto kaj mecenato de la japana kaj internacia movado. Por lia internacia komercado, li devis unue lerni la anglan lingvon, por lia fabriko en Koreio li devis denove lerni la korean lingvon, sed nun por liaj fabrikoj en Ĉinio, li ne plu povis elspezi tiom da energio per lerni la ĉinan lingvon. Li ankaŭ devas ofte vojaĝi al Germanio, Francio, Norvegio ... Finfine li faris tre racian decidon kaj komencis lerni Esperanton. Pere de lia persona sperto, li instigis, ke oni lernu kaj uzu Esperanton en la komercaj laboroj.

Poste intervenis s-ro André Grossmann el Alzaco, unu el la gvidantoj de TAKE (pri komerca agado de TAKE, ekz. vendado de adreslistoj de personoj interesataj, pri bezonantoj de specifaj varoj kaj pri sukceso de vino kun E-a marko); s-ro Sun Mingxiao el Ŝanhajo (KN387); s-ino Li Renzhi Eruda el Hongkongo (KN573): ("Mi havas Esperantan komercan kompanion, kie amikeco venas unua, negoco dua. Gravas ne nur profito, sed E-lernado. Esperanto ne utilas ĝenerale, ekz. ne ĉe la registaro, nek por turismo ĉar ekzistas multaj agentejoj ofertantaj pli bonajn servojn, restas nur komerco."); s-ro Wang ("utilas informagado de IKEF"); Prof. Oba el Japanio ("Necesas komunikado, diferencas kulturoj, kiujuj miksi kreas ion novan"); s-ro ? (KN500 - "Mi iris al Turkio kaj pasigis tempon nur per Esperanto kaj la ĉina. Mi fondis kompanion en Turkio, nomatan Turka Ĉiela Drako, ankaŭ alian en Bulgario. Ni ne povas investi enlande, do mi faris tion eksterlande kaj sukcesis."); s-ro Kep Enderby, juristo el Aŭstralio ("terminaro estas grava, nun se oni ne povas kompreni la anglan, oni ne povas kompreni la aferon"); usona sinjorino (kiu instruas komercon en la angla kaj baldaŭ la anglan en la provinco Shaanxi en Ĉinio kaj volas lernigi Esperanton al siaj studentoj).

S-ro Wang petis voĉdoni siajn du proponojn, neniuj levis manon, li do deklaris ke "sen opinio" signifas aprobi, kaj li sendos ilin kiel rezolucion de la kunsido al s-ro Braun. Yamasaki rezervis, dirante ke ankaŭ li sendos sian opinion al la prezidanto: pri (a) eble s-ro Wang pravus, sed (b) kontraŭas al la principo de IKEF, kaj li ne povas aprobi; li sugestos al s-ro Braun ke tian kunvenon s-ro Wang povu okazigi je sia propra respondeco kun beno kaj morala subteno de IKEF.

(surbaze de raportoj de LI Renzhi kaj YAMASAKI Seikō)

Sindikata Terminaro

Ĝus antaŭ la UK pretiĝis la Sindikata Terminaro, komencita de Hans Wiersch kaj finpretigita de Yamasaki Seikō. Bazo estis terminaro de la Eŭropa Unio. En ĝi estas 415 terminoj en lingvoj germana, angla, franca kaj esperanta. Ne estas definitiva versio: ĝi estis eldonita malgrandkvante por ebligi kontrolon de la terminoj al pli larĝa kunlaborantaro. Kelkaj ekzempleroj restas aĉeteblaj ĉe Flandra Esperanto-Ligo kaj ĉe estraranoj Braun kaj Yamasaki. Prezo: 125 BEF + sendkostoj.

Intertempe jam alvenis kelkaj korektoj:

245: fr: mensualisation

338: de: Einspruchsrecht

347: de: aldonendas "WGB"

349: de: Berufsleben

RR

Stipendio Ivo Lapenna

Memore al prof. d-ro Ivo Lapenna (1909 - 1987) kaj al liaj elstaraj meritoj por la Internacia Lingvo kaj ties aplikado en la scienco speciale, Fondaĵo "Ivo Lapenna" starigis "Stipendion Ivo Lapenna".

La Stipendio konsistas el subvencio al disertacioj je universitata nivelo (doktoriĝoj, magistriĝoj, licencioj), kiu temas pri esperantologio kaj/aŭ pri Esperanto en rilato kun interlingvistiko kaj estas ellaboritaj en la spirito de L.L. Zamenhof kaj Ivo Lapenna.

En la jaro 1997 Stipendio Ivo Lapenna povas esti aljuĝita por disertacioj oficiale akceptitaj de universitata instanco en 1996.

Aŭtoroj dezirantaj kandidatiĝi al la Stipendio bv. peti la detalan regularon de la sekretario-kasisto de Fondaĵo Ivo Lapenna, s-ro Torben Svendsen, Vanlose All 57, DK-2720 Vanlose, Kopenhago, Danio.

Tempolimo por la transsendo de la faklaboraĵo en du ekzempleroj estas fine de februaro 1997. Adreso: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, AU-8020 Graz, Aŭstrio.

Klaus Perko, Prez. de Fondaĵo Lapenna (rete: lapenna(a)cybernet.dk)

CD-ROMo pri Esperanto farota

Du germanaj studentoj preparas CD-ROMon, eldonotan de Germana Esperanto-Asocio okaze de la venontjara Eŭropa Kongreso en Stuttgart. Por tiu projekto ili serĉas diverstemajn tekstojn (esperantajn kaj tradukitajn), katalogojn, lernilojn, prezentaĵojn de E-asocioj... Redaktofino estas 12 decembro 1996.

Stefan Fisahn, Friedrich-Ebert-Str. 71, D-70191 Stuttgart

(fisahn(a)hbi-stuttgart.de)

Tilman Meierfrankenfeld (meierfr(a)unu-muenster.de)

Informilo por Interlingvistoj informas esperantologojn

En Esperanto kaj diversaj naciaj lingvoj aperas pli kaj pli multe da ofte malfacile trovebla scienca materialo pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj, gravaj por sciencaj studoj kaj esploroj.

Seriozaj interlingvistoj kaj esperantologoj klopodas sekvi la fakan literaturon. Tion grave faciligas Informilo por Interlingvistoj (IpI), kiun eldonas Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED). La aktuala (tria) serio startis en 1992. Aperis ĝis meze de 1996 entute 17 numeroj kun sume 156 paĝoj, plenaj de utilaj informoj, plejparte bibliografiaj.

IpI estas abonebla ĉe UEA (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando). Jarabono por tri 16-paĝaj A5-formataj kajeroj kostas 10 guldenojn (por EU-landoj 10,60 gld.). Estas ankoraŭ riceveblaj la jarkolektoj 1992-1995 (po 10 gld.). Seriozaj interesitoj el landoj kun transpagaj problemoj povas laŭpete ricevi IpI senpage.

Informilo por Interlingvistoj estas redaktata de d-ro Detlev Blanke (Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, Germanio), kiu volonte akceptas materialojn pri ĉiuspecaj interlingvistikaj aktivecoj, projektoj kaj publikaĵoj.

Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA

Ŝtupo post Ŝtupo - libro al prospera uzo de Esperanto

Baksa József en poŝlibreto arigis amason da konsiloj same taŭgaj por novaj kaj por spertaj esperantistoj. La kvin ĉapitroj pritraktas la sinperfektigon, la kolektadon de utilecoj, la praktikan uzadon, la disvastigadon kaj la lernadon. Enestas la bazaj informoj pri la movado, sed ankaŭ multaj praktikaj konsiloj (ekzemple: kiel akiri kliŝon por afrankomaŝino, kiel organizi ideoborson). Kvankam la aŭtoro estas hungaro kaj foje estas pritraktata hungara situacio, plejparto de la konsiloj uzeblas tutmonde.

160 p., A6, prezo: 8,00 NLG + afranko. Aĉetebla ĉe la aŭtoro:
Baksa József, PLU, pk. 263, H-8901 ZALAEGERSZEG, Hungario.

Korespondpeto

S-ino Peng Li, Guangzhou Fangcun, Shachongxincun, 2 St. No. 3 Rm 404, CN-510380, deziras korespondi kum amikoj pri komerco. Ŝi okupiĝas pri internacia komerco en Ĉina Guangzhou-a internacia ekonomia k

teknika kooperativa Corp., suda Ĉinio. Eksportataj varoj estas malpezaj industriaĵoj, mebloj, kostumoj, vivbezonaĵoj, medikamentoj k.a. Tel. (8620) 81806451, fakso 87667665.

TermNet-Infoterm havas novan adreson

Infoterm, SIG Technology Centre Vienna, Simmeringer Hauptstr. A-1110 WIEN, Aŭstrio; telefono +43-1-74040-441, fakso 74040-740, rete 100534.3651(a)compuserve.com.

Unuan fojon la eŭropaj instancoj financas projekton de esperanta organizaĵo !

La Eŭropa Komisiono aprobis la studoprojekton pri "Kostoj de (ne)komunikado en Eŭropo", prezentita de Esperanto Radikala Asocio. La projekto, sub la aŭspicio de la '94jara nobelpremiito pri ekonomiko Reinhard Selten, estos financata 55%, kaj ebligos informi pri esperanto la plej vastan nombron iam ajn atingitan da politikistoj, entreprenistoj, instruistoj: 100.000 personojn ! (Ni memoru ke la Eo-movado ekkomenciĝis per multekosta dissendado, fare de Zamenhof, de 10.000 ekzempleroj de la Unua Libro).

Tamen tiu ĉi projekto plenumiĝos nur se oni trovos, antaŭ la 1996a jarfino, la restantajn 60 mil usonajn dolarojn kiujn la Eŭropa Komisiono ne pagas. Se tio ne okazos, ERA (kaj esperantaro) devos forlasi la projekton. Tial ni alvokas ĉiujn esperantistojn kaj Eo-organizaĵojn en la mondo: Unuigu viajn fortojn al niaj, tre malgrandaj...kontakto nin, kunlaboru, financu tiun iniciaton!

- per kreditigo al nia UEA-Konto erad-p
- sendante kompletan kreditkartan numeraron, indikante la sumon kaj valuton elverŝitan, fakse al +39+6+68805396, poŝte al ERA, Via Torre Argentina 76, 00186 Romo, Italio, rete al E.R.A.(a)agora.stm.it.

Per la samaj adresoj vi povas demandi al ni pliajn informojn pri la projekto, pri niaj agadoj kaj pri la Radikala Partio.

Giorgio Pagano, Sekretario (komuniko de 4 septembro 1996)

Intertempe, Osmo BULLER, ĝenerala direktoro de UEA, sendis negativan reagon, bazitan sur diskuto de la UEA-estraro dum la UK en Prago. Jen parto de ĝi:

UEA ne volas nei la agemon kaj certagradan sukceson de ERA, kiam

temas pri subvencijetoj kaj similaj agadoj ĉe politikaj kaj edukaj instancoj. Tamen ni substrekas, ke por longdaŭra agado sur firma bazo necesas pli da vera konsultado kaj kunlaboro kun aliaj organizaĵoj de la E-movado, kaj pli da publikeco pri la financaj kaj aliaj rezultoj de la projektoj.

Kapitalkomerca terminaro sur CD-ROMo

En Hispanio aperis plurlingva vortaro kun 7000 terminoj en 11 lingvoj de la Eŭropa Unio kaj en usona angla (ĉar iu termino ne nepre havas la saman signifon en Eŭropo kaj Ameriko). Difinoj estas en 5 lingvoj (franca, angla, germana, itala, hispana). La tuto troviĝas sur CD-ROMo, sed estas aldone presita glosaro en 5 lingvoj. Informoj: Isabel Alvarez Carmona, LID Editorial Empressarial, Sopelana 22, La Florida, E-28023 MADRID; tel. +341 1 329 5000, fakso 4844.

(laŭ 'Le Magazine', revuo de la EU pri instruado, 5-96, prezo ne menciita)

Ĉeha studkonferenco de AIS...

De la 21a ĝis la 30a de julio en Prago (CZ) okazis la 16a "Sanmarinea Universitata Sesio" (SUS 16) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino.

Post sukcesa kunlaboro ("AIS-IKU") de AIS en la Internaciaj Kongresaj Universitatoj en Seulo kaj Tampere, nun unuafoje la kompleta studprogramo de tia konferenco estis integrita kun Universala Kongreso de UEA. Preskaŭ 3000 kongresanoj tiel havis okazon sen SUS-aliĝo partopreni en la kursoj de AIS, kiuj okazis paralele kun al kaj ankaŭ iom post la UK. La plej multnombraj aŭskultantaro havis Prof. Reinhard Selten, kvankam li devis tempe konkurenci al la kongresaj ekskursoj. Ĉ. 60 homoj venis por aŭdi la ok-horan kurson pri la temo "ludoteorio" de la Nobel-premiulo pri ekonomiko kaj parte por ricevi aŭtografon en ties esperantlingva libro. Entute okazis ses tiaj kursoj kaj aro da liberaj prelegoj.

Kadre de la solena fermo de SUS 16 la prezidanto de AIS, Prof. Helmar Frank povis unuafoje transdoni la premion "Wiener-Schmidt" de la Germana asocio GPI (Asocio pri Pedagogio kaj Informo). La premio estis fondita honore al Norbert Wiener kaj Hermann Schmidt, la fondintoj de la kibernetiko, kaj honoras meritojn pri tiu scienco. Ĉi-jare ĝin ricevis la ĉeha klerig-kibernetikisto Prof. Milos Lansky, kiu povis akcepti la premion okaze de sia 70-a naskiĝtago.

... kaj studkonferenco de AIS kun du neŭtralaj lingvoj

La 17-a Sanmarina Universitata Studsesio (SUS 17) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino okazis de la 2-a ĝis la 6-a de septembro 1996. La ekzamenoj kaj la fina solenaĵo lokiĝis en la respubliko San-Marino, naskiĝlando de la akademio. La plejparto de la kursoj, prelegoj kaj diskutoj tamen okazis en la proksima itala urbo Rimini, samkiel la solena inaŭguro, por kiu la loka universitato disponigis sian aŭlon.

Enkadrigite en la artan prezentadon de 30-persona koruso el Polio, parolis tie krom la prezidanto de UEA ankaŭ reprezentantoj de la lokaj instancoj kaj de "symposium latinum" (latina simpozio), kiu unuafoje okazis kadre de AIS-konferenco.

Kiel emfazis la latinisto prof. Vido Angelino, Esperanto kaj latino ne konkurencas pri interkompreniĝo, sed suplementas unu la alian. Tiun pacan kunekzistadon pruvis ankaŭ la latinistaj kunsidoj, kiujn regule ĉeestis aro da esperantistoj ne-latinistaj, kiuj tamen sukcesis bone sekvi la prelegojn.

Nova plenrajta membro de AIS fariĝis la konata franca biologo Claude Roux, specialisto pri likenoj, kiu verkis pri sia fako ankaŭ en la internacia lingvo.

AIS okazigos ankoraŭ ĉi-jare plian studkonferencon en la rumana urbo Sibiu, la kvaran en 1996. Por 1997 ĝi planas konferencojn en Bydgoszcz (PL) kaj denove en Rimini/San-Marino; krome dum la UK de UEA en Adelaido (Aŭstralio).

Reinhard Foessmeier, reinhard.foessmeier(a)ixos.de

Komercaj petoj kaj proponoj

Ĉinio

Mu Binghua (IKEF 213) volonte helpas vin aĉeti ĉinajn periodaĵojn, ĉinstilajn pentraĵojn kaj kaligrafiaĵojn. Adreso: Chengdu Universitato, CN-610081 Sichuan, Chendu.

Fujian Provincial Township Enterprises Ass. Corp. estas duonpublika industria grupo kun entreprenzono ĉe la vojo Fuzhuo-Xiamen en suda Ĉinio. Dekoj da fabrikoj kontaktas i.a. kostumojn, ŝuojn, skribilojn kaj elektronikaĵojn. Informoj: s-ro Zhen Jian Rong, Dong men, ta tou, Xin Cun 4 zuo 604 Hao, CN-350011 FUZHOU, FUJIAN.

Hungario

Malmultekostajn vestaĵ-produktojn kaj multspecajn papervarojn vendas s-ro Roberto Juhász, Csokonai str. 86, H-5000 SZOLNOK.

Jugoslavio

Serĉas komercan kunlaboron kun i.a. Korea Respubliko, Ĉinio, Hongkongo, Japanio, Tajlando. Aĉetas teksaĵojn por virinaj vestaĵoj, malpezajn materialojn (akrigitan poliestron kaj mikrofibron, 150 cm larĝan). Ofertojn (prezoj en USD kaj DEM) kaj specimenojn atendas Vujnić Dragan (IKEF 224), Paunova 75/I.6, YU-11040 BEOGRAD, tel. 011/669-553 aŭ 070/11-998 (prefere).

Identecŝildoj

Apenaŭ venis reagoj al la alvoko en LM 53 por sendi sian identecŝildon. Tial ne plu aperos la dujara broŝuro, sed ĉiujare la membroj ricevos kompletan membroliston kaj en ĉiu numero de la revuo aperos la ricevitaj identecŝildoj.

+++++

Nomo: S-ro Daniel DURAND Membrnumero: 187
Profesio: sekretario - tradukisto Naskiĝjaro: 1949
Nomo de la firmao: Internacia Traduk-Reto pere de Esperanto "ITRE"
- Asocio por Antaŭenpuŝo de la Solidareco "AS.PROS"
Adreso: "Les Nids", F-49190 SINT AUBIN DE LUIGNE, Francio
Telekomunikado: telefono+fakso: +33 02 41.78.47.75

Proponataj servoj:

